

# Enhavo

- **anoncoj**

Forpasoj de Yvette MASSEY, Donald BROADRIBB kaj Dori VALLON-WHEELER; TKEK okazos en Sakramento; AAIE elektas novajn reprezentantojn; Korespondi deziras; Novaj varoj en la libroservo

- **loke**

Vermonta restoracio famiĝas danke al Esperanto; Estontecologia vidas grandan ŝancon por nia lingvo

- **La konkretaj avantaĝoj de internacia komunikilo**

Kiel ni, la opaj individuoj, kiuj konsistigas la Esperantan popolon, povas utiligi la lingvon por satigi niajn bazajn homajn bezonojn ĉiutagajn?

- **NASK 2013**

La Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto okazos samloke kun la Landa Kongreso, kiu komenciĝos fine de la kursaro.

- **NASK 2013**

The North American Summer Esperanto Institute comes to William Peace University in Raleigh, NC. Stay for the the National Convention of Esperanto-USA, in the same location.

- **Landa Kongreso 2013**

Anonco pri la Landa Kongreso de Esperanto-USA en 2013 ĉe La Universitato William PEACE en Raleigh, Norda Karolino.

- **Esperanto-USA National Convention for 2013**

An announcement of the National Convention of Esperanto-USA for 2013, at William Peace University in Raleigh, North Carolina.

- **Mia malkovro de Japanujo (dua parto)**

Jenja rakontas siajn aventurojn tra Kioto, Kameoka kaj Ajabe, kun vizito al la junulara festo de Oomoto.

- **Translation for learning**

In the last century or so, translation exercises have fallen out of fashion. Now, however, the language teaching community is coming around to the idea that there's a place for translation in language teaching after all.

- **Indaj aĵoj**

Vaŝingtonano Joshua MORRIS dividas kun ni siajn spertojn en Kameruno, kie li laboras por la Usona Pac-Korpuso.

- **“Vermaland”**

Ĉu temas pri fekunda grundo, aŭ inteligentaj vermoj? (Dankon al Breto SANDERS.)

ISSN: 1056-0297

**Usona Esperantist**

Dumonata bulteno de Esperanto-USA • Numero 2012:6 (nov-dec)

Bi-monthly bulletin of Esperanto-USA • 2012:6 (nov-dec)

**American Esperantist**

**Ĉi-numere:**

- Vermonta restoracio famiĝas pro Esperanto
- Instruado: Translation for Learning
- Vojaĝo en Japanujo (parto 2)
- ...kaj multe pli!

**LK kaj NASK en 2013 ĉe la Universitato William PEACE**

## anoncoj

---

### Forpasoj

- **Yvette MASSEY**, dumviva membro de Esperanto-USA, forpasis la 15-an de Septembro. Ŝi loĝis en Columbus, Ohio, kaj havis 94 jarojn. Ŝi partoprenis multajn kongresojn, naciajn kaj internaciajn.
- **Donald BROADRIBB** forpasis la 13-an de Oktobro. Li naskiĝis en Usono en 1933, kaj loĝis en Aŭstralio ekde 1974. Broadribb studis filozofion, teologion kaj lingvosciencan en Usono kaj Aŭstralio kaj psikanalizon en Svislando. Li esperantistiĝis en 1946 kaj membriĝis en UEA en 1950. Li redaktis plurajn Esperanto-gazetojn en Usono kaj Aŭstralio, fondis diversajn revuojn, kaj tradukis famajn verkojn de multaj aŭtoroj, inkluzive de Platono, Lewis CARROLL, L. Frank BAUM kaj George ORWELL, inter aliaj.
- **Dori VALLON-WHEELER**, dumviva membro de Esperanto-USA kaj AAIE, mortis la 2-an de Novembro en Millbrae, Kalifornio. Ŝi estis 86-jaraĝa. Dori multe donacis al Esperanto-organizaĵojn kaj subtenis diversajn projektojn.

Ŝi verkis poemojn en Esperanto, interalie *La Kialo Estas*, kiu aperis en *Esperanta Antologio – Poemoj 1887-1981* redaktita de William AULD.



Ekster Esperantujo, Dori estis dum multaj jaroj profesia instruisto. Ŝi instruis infanojn en lernejo apud Sanfrancisko, kaj de Septembro 1989 ĝis Marto 1990 ŝi instruis la anglan en Ĉinujo.

Dori ofte ĉeestis Esperanto-aranĝojn, kaj aparte rimarkinde, ŝi partoprenis en ĉiu Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto

(NASK) ekde ĝia estiĝo en 1969, ĝis 2010. Dum ŝia antaŭlasta NASK en 2009 ŝi estis agnoskita kiel la plej longdaŭra partoprenanto. Ŝi lastfoje ĉeestis la Landan Kongreson de Esperanto-USA en Emeryville en 2011. Ni, kiuj konis ŝin, ĉiam memoros ŝian grandan rideton kaj oftan ridon, kaj ni forte sentos ŝian mankon.

*(Dankon al D. Gary GRADY, Anja HARLOW, Doroteo HOLLAND, Viĉjo HARRIS, d-ro Franklin MONTENEGRO, kaj aliaj pro la informo.)*

### Planoj firmiĝas por TKEK 2013 en Sakramento

La Tut-Kalifornia Esperanto-Konferenco (TKEK) okazos **de la 19-a ĝis la 21-a de Aprilo** ĉe la Internacia Junulara-Gastejo en Sakramento. Loĝprezoj por vojaĝantoj kiuj mendas antaŭ la 15-a de Februaro varias inter \$60 por dividita ĉambro en amasloĝejo ĝis \$163 por privata ĉambro por du homoj. La aranĝo estos neformala, amuza renkontiĝo perfekta por gejunuloj (kaj junkoruloj de ajna aĝo). Ni kuiras kune, ludos aktivajn kaj tablajn ludojn, havos interesajn diskutojn, kaj piede esploros la urbocentron kune... kaj plej multe ni praktikos paroli Esperanton! Estos kurso por komencantoj, kaj ne-esperantistaj partneroj de partoprenantoj estas bonvenaj.

Por aliĝilo kaj programinformo, kontaktu s-inon Amanda Higley SCHMIDT rete: <amanda\_higley@yahoo.com>, telefone: 916-709-7207 aŭ poŝte: **Amanda Higley Schmidt, 4436 Montcurve Blvd., Fair Oaks, CA 95628.**

### AAIE elektas novajn reprezentantojn

Laŭ voĉdono en Oktobro de la estraro de Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto (AAIE), niaj

longdaŭraj membroj Duncan CHARTERS, Ron GLOSSOP kaj Lusi HARMON reprezentos la organizaĵon en la Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj (ILEI). La deĵoro daŭros du jarojn.

La Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto (AAIE) invitas ĉiujn esperantistojn subteni la organizaĵon. Ne necesas esti instruisto. La Esperanto-movado bezonas la laboron de AAIE, kaj vi nun povas aliĝi al AAIE ĉe la retbutiko de Esperanto-USA [<http://goo.gl/BCqoc>].

Dankon pro via subteno.

— Ronald GLOSSOP, Prezidanto, AAIE

## Korespondi deziras

- 45-jara esperantisto de Ukrainujo, fraŭlo, serĉas amikojn de Usono kaj de la tuta mondo por korespondi pri lingvoscienco, arto, literaturo kaj politiko. **Sergio Ivaniuk, Bocharova 14A - 137, 69098 Zaporizhia, Ukraine, Europe.** <[serghi@i.ua](mailto:serghi@i.ua)>
- Mi estas viro emerita kaj mi havas sepdek jarojn. Mi ŝatas pentri, aŭskulti bonan muzikon, kaj legi literaturon. Mi studas Esperanton kaj mi volas praktiki la lingvon per korespondado kun amikoj en aliaj landoj. Mia urbo estas en Andaluzio, en la sudo de Hispanujo. **Salvador Palma Daniel, Jamaica, 11, 29010 MÁLAGA (España)**

## Novaj varoj en la libroservo

### BILDVORTARO EN ESPERANTO

#### Desmet' kaj Horvath

800-paĝa verkego kun pli ol 30 000 terminoj kaj bildoj. La nuna eldono estas bazita sur la iama eldono de Rudiger EICHHOLZ, kiu siavice estis bazita sur la 2-a eldono de la fama bildvortaro de la germana eldonejo Duden. La nova versio estas adapto de la 6-a eldono de la vortaro de Duden,

kaj pro tio estas multe pli ampleksa. 25% de la nunaj terminoj jam aperis en la adapto de Eichholz; la cetero estis aldonita de la prizorgantoj de la nova versio, la konataj vortaristoj Petro DESMET' kaj Jozefo HORVATH. Malmola bindaĵo. 800 paĝoj. 210x155.

2012. Belgujo.

978-9077066-48-5. **\$66.70.** (ligilo) [<http://goo.gl/P6Zr3>]



### BELETRA ALMANAKO 13

Prozo de Ulrich BECKER, Miguel FERNÁNDEZ, Júlia SIGMOND, Tim WESTOVER. Poezio de Auld, Ragnarsson, Mitin, Camacho, Godoy, Malia, Zifu, Neves, Philippe, Romero, Urbanová. Eseoj, artikoloj, teatraĵo, leteroj, kaj recenzoj de multaj famaj verkistoj. Mola bindaĵo. 171

paĝoj. 210x140. 2012. Usono. 978-1-59569-236-8. **\$13.10.** (ligilo) [<http://goo.gl/lxeKR>]



### BELETRA ALMANAKO 14

Prozo de Bronštejn, Smith, Dobozy (tradukita de Faanes). Poezio de Reyna, Naŭmov, Ruggiero, Pannonius (tradukita de Rados). Teatraĵo, eseoj, artikoloj, leteroj kaj recenzo. Mola bindaĵo. 145 paĝoj.

210x140. 2012. Usono.

978-1-59569-250-4. **\$13.10.** (ligilo) [<http://goo.gl/PoKa9>]



Order from **Esperanto-USA, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530**, or online [<http://esperanto-usa.org/retbutiko>]. If a title is out of stock, the online bookstore can notify you by email when it becomes available again. Due to fluctuations in the value of the dollar, all prices are subject to change without notice.



## Vermonta restoracio famiĝas danke al Esperanto

Raportas Ĵenja (Yevgeniya) AMIS,  
<yevgeniya.amis@gmail.com>



Ŝildo de la restoracio *Esperanto* en Burlington, Vermonto.

BURLINGTON, VERMONTO — Antaŭ kelkaj monatoj en kanada televido oni montris novaĵeron pri la urbo Burlington, Vermonto. Oni raportis, ke en tiu ĉi loko, kiun National Geographic eĉ nomis “perfekta eta urbo” por altiri franclingvajn turistojn, la registaro aktive kuraĝigas firmaojn uzi la francan: farante dulingvajn afiŝojn, tradukante menuojn kaj dungante vendistojn, kiuj scipovas la francan. Mi havis tute neatenditan okazon viziti tiun ĉi ĉarman ĉe-lagan urbon, kaj eĉ se mi ne trovis la urbon aparte dulingva (fakte, neniuj lokanoj, kun kiuj ni babilis, eĉ sciis pri tiu projekto dulingvigi la urbon), ni tamen malkovris tie ion, kiu iusence famigis tiun urbon inter esperantistoj tra la mondo!

Unue mi klarigu, kial nia vizito al Burlington estis neatendita. Ni iris al Usono por aranĝi kelkajn bankajn aferojn, kaj post horo da ŝoforado ni rimarkis, ke ni iras en malĝusta direkto. Do, anstataŭ al Novjorkio, kien ni planis iri, ni decidis iri al Vermonto. Bonŝance, ni atingis la bankon ekzakte tri minutojn antaŭ la fermo. Sed kia surprizo! (Aŭ ĉu sinkroneco?) Tuj trans la strato de la banko ni trovis restoracion “Esperanto”. Kompreneble, ni ne povis maltrafi la okazon viziti ĝin. Mia duonŝerca demando en la angla “Ĉu vi havas la menuon en Esperanto” iom konfuzis la kelneron, kaj mi devis ripeti ĝin dufoje. Kvankam li bone konsciis pri la nomo kaj ĝia rilato al la lingvo, li ne komprenis, ke antaŭ li troviĝas

homoj, kiu fakte parolas tiun lingvon.

De la kelnero mi eksciis, ke la restoracio funkcias ekde 1995 kaj estas aparte populara inter junuloj (verŝajne, ĉar la prezoj estas tute akcepteblaj, kaj la porcioj estas tute malavaraj). Ili elektis tiun nomon ĉar oni ŝatis la ideon de Esperanto (fakte, sur la muroj oni povas legi klarigojn pri Esperanto prenitajn el Vikipedio), kaj eĉ la menuo estas farita por iusence reprezenti la lingvon: ĝi estas kreema elekto de usonaj, mediteraneaj, meksikaj kaj aziaj pladoj, multaj taŭgaj por vegetaranoj.



Ricevinte mil “ŝatantojn” en la socia retejo Facebook, la posedantoj de la restoracio donacos mil dolarojn por manĝigi malriĉulojn en Vermonto.

Mi ankaŭ lernis, ke la restoracio organizas grandan bonfaran kampanjon por helpi malriĉulojn kaj samtempe diskonigi la restoracion ĉe Facebook: se ili kolektos mil “ŝatojn”, ili donacos mil dolarojn al loka manĝaĵ-banko. Reveninte hejme, mi plusendis tiun informon al miaj amikoj, kiuj plusendis ĝin al siaj amikoj, ktp. Ene de kelkaj tagoj la retejo ricevis jam ĉirkaŭ ducent pliajn “ŝatojn” kaj tiel multe pli alproksimiĝis al la necesaj mil. La respondeculoj de la paĝo estis tute surprizitaj pri la “inundo” de novaj ŝatoj de ĉie en la mondo: Kostariko, Japanujo, Rusujo, Nederlando, Hungarujo... Multaj homoj lasis salutojn, komentojn, kuraĝigojn, fotojn kaj informojn pri aliaj restoracioj kun la nomo Esperanto, kaj kompreneble, proponojn traduki la menuon en Esperanto. “La kvanto de la lingvoj ĉe nia retejo

jam preterpasas niajn kapablojn”, skribis la respondeculoj kaj petis helpon traduki. Kompreneble, venis kaj tradukoj, kaj la informoj, kie oni povas lerni Esperanton (Lernu.net) kaj la eblo uzi la ilon Google Translate. Finfine, la posedantoj de la restoracio eĉ mem respondis en Esperanto. (Surprize, eĉ tute bone!)

Se vi ankoraŭ ne vizitis tiun paĝon por “ŝati” ĝin, bonvolu fari tion [<http://facebook.com/esperantoburlington>] kaj plusendu al viaj amikoj! Tio helpas ne nur nutri la malriĉulojn dum tiu ĉi festa sezono, sed ankaŭ montros, ke Esperanto estas vivanta kaj uzata lingvo... kaj jes, ankaŭ en Usono!

## Estontecologo vidas grandan ŝancon por Esperanto

Raportas James RYAN,  
<[jamesviii@earthlink.net](mailto:jamesviii@earthlink.net)>

VAŜINGTONO — La 16-an de decembro, fama estontecologo (angle, *futurist*) diris al vaŝingtonaj esperantistoj ke ties mondlingvo havas unikan ŝancon fariĝi kerna parto de la estonteca mondo.

David Pearce SNYDER estis gastparolanto ĉe la ĉiujara bankedo de Zamenhof-Tago de la Esperanto-Societo de Vaŝingtono. “Ni estas en la estonteco ĝuste nun”, diris Snyder, kiu aperis televide en programoj de ABC, NBC, CNN kaj MSNBC. “Kaj ni ĉiuj estas estontecologoj”, li diris en sia parolado titolita *Bonvenon al la Nova Normalo*, kiu donis superrigardon de estontecologio kaj citis vastan gamon de pensuloj kiel Locke, Newton, von Neumann, Teilhard de Chardin kaj Kurzweil.



Vaŝingtonanoj festas Zamenhof-tagon. De maldekstre: Charles POWER, Daniela POWER, Harold GOODMAN, David GAINES, edzino de David SNYDER, Melisa RYAN, David Pearce SNYDER (gastparolanto), Jim RYAN. Foto danke al Emil VOLCHECK.

Snyder citis studon de la Fonduso Pew kiu konfirmas ke retumado baldaŭ estos, se ĝi jam ne estas, ĉe la kerno de nia vivo en la 21-a jarcento. En mondo informata de Interreto, monda lingvo kiel Esperanto – kiu mem temas pri kontakto kaj komunikado – devus esti tute ĉeĥejme en la nova mondo.

Ekzemple, Snyder diris, Esperanto povus esti utila rimedo por indiĝenaj popoloj kiuj uzas Interreton por komunikigi kaj kunlabori – sen submetiĝi al lingvoj aŭ kulturoj de plimulto. Plenumante tiun bezonon, “Esperanto povus kapti tiun avantaĝon antaŭ ol la cetero de la mondo”, li diris.

Snyder multfoje revenis al la temo de komplekseco, kiu, li diris, laŭ John LOCKE estas aferoj kiuj spitas homan komprenon – almenaŭ por nun. Li proponis ke esperantistoj levu la demandon: ĉu kompreni kompleksan mondon estas pli facile en Esperanto?

La plimulto de estontecologoj, li diris, konsentas ke kulturaj konfliktoj estas inter la plej grandaj hodiaŭaj defioj. Esperanto, kompreneble, ŝuldas sian naskiĝon al la pasio de Zamenhof, inter aliaj, por sanigi interkulturan malakordon.

Vigla diskutado sekvis pri la multaj manieroj en kiuj Esperanto jam pruviĝis utila kiel kondukilo, interalie kiel ponto inter maŝinaj tradukiloj. Oni ankaŭ parolis pri la jam impona rolo de Esperanto en Interreto, sed konsentis ke ĝi povas kaj devus

esti pli granda.

Snyder ankaŭ proponis ke esperantistoj eble faru prezentadon al kuniĝo de estontecologoj:  
“Esperanto – ĉu la lingvo de la estonteco?”

## **Sanktaluisanoj festas Z-tagon per donaco**

*Raportas Ron GLOSSOP,*  
<[rglossop@mindspring.com](mailto:rglossop@mindspring.com)>

SANKTA-LUIISO, MISURIO — La ĉiujara Zamenhofa Bankedo de la Esperanto-Asocio de Sankta-Luiso okazis la 9-an de Decembro. Partoprenis Duncan CHARTERS, Peggy DOLTER, Audrey GLOSSOP, Ron GLOSSOP, Jerry JOHNSON, kaj Jeff WILSON. Post la manĝo ni kantis Esperantajn kantojn kun la melodioj de la sezono. Ni decidis kontribui \$100 al la UEA-Fondaĵo por Afriko.

## **Seminario pri Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko**

*Raportas Humphrey TONKIN,*

<[tonkin@hartford.edu](mailto:tonkin@hartford.edu)>

HANOJO, VJETNAMUJO — La 97-a Universala Kongreso de Esperanto, organizita de Universala Esperanto-Asocio en Hanojo, Vjetnamujo, de la 28-a de Julio ĝis la 4-a de Aŭgusto, estis la loko de seminario (en Esperanto) pri la laboro de Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko.

La seminario, sub gvido de Humphrey TONKIN kaj Neil BLONSTEIN, reprezentantoj de UEA ĉe la ĉefsido de UN en Novjorko, kaj Renée TRIOLLE, reprezentanto de UEA ĉe Unesko, donis superrigardon de la strukturo de la du organizaĵoj, kaj precipe de iliaj humanecaj kaj homrajtaj agadoj. La celo de la seminario estis prezento de la UN antaŭ la Esperanto-komunumo.

Kvardeko da homoj partoprenis, el larĝa gamo de landoj kaj profesioj, inkluzive instruistojn. Materialoj el la seminario estas konsulteblaj en la retpaĝaro de Esperanto por UN [<http://www.esperanto-un.org>], kie troviĝas ankaŭ Esperanto-tradukoj de gravaj dokumentoj de UN, kune kun terminaro pri UN kaj priskribo de la strukturo de UN.

# La konkretaj avantaĝoj de internacia komunikilo

Orlando E. RAOLA

**P**ost ununumera paŭzo, mi sidas denove kaj entajpas mian “homilion” (kiel afablemokete baptis ilin kara amiko kaj fidela leganto A.S.). Kompreneble, ĉar mi verkas tiujn ĉi liniojn fine de Decembro, mi tute ne povas eviti la naturan emon retrorigardi al la pasintaj dek du monatoj por iel taksi la atingojn kaj mistrafojn, kaj samtempe plani kaj revii por nova ciklo ĉirkaŭsuna tuj komenciĝonta post deko da tagoj.

La jaro 2012, laŭ prognozo de kelkaj la jaro de la fino de ĉio, estis bona jaro por la agado de esperantistoj tutmonde, kaj ankaŭ en nia lando. Sukcesaj landa kaj universala kongreso, daŭrigo de la instrua kaj eldona agado, plifortikiĝo de la reta kaj socikomunikila ĉeesto de Esperanto... Tamen, ni ĉiam sopiru “pli alten, pli rapide, pli forte...”

Historie, ni esperantistoj ĉiam emis serioze konsideri, abunde pridiskuti kaj priverki la filozofiajn demandojn: ĉu la mondo bezonas Esperanton? Ĉu la mondo estas preta por ĝi? Per jesa respondo por la unua kaj nea por la dua ni ĉiam pravigis nian suspektatan mankon de progreso kaj la ĝeneralan frustiĝon de “poetoj sen popolo...”

Sed eblas revortumi tiujn demandojn tute alimaniere: kiel ni, la opaj individuoj, kiuj konsistigas la Esperantan popolon, povas utiligi la lingvon por satigi niajn bazajn homajn bezonojn ĉiutagajn? La bezono je amikeco, je interŝanĝo de ideoj, la bezono je kunlaboro cele al atingoj de celoj tro grandaj aŭ tro malfacilaj por la fortoj de izoluloj... Ĉu la mondo povos rimarki, ke ni posedas helpilon kiu plifaciligus kaj pliriĉigus la vivon de tiuj, kiuj mem decidis alproprigi al si tian helpilon?

Ĉi matene, mi havis longan paroladon kun junulo, iam antaŭe studento en mia lernejo, kiu planas vojaĝi al Kubo kaj pasigi tie plurajn monatojn. Li

volas studi surloke la atingojn de la kubanoj rilate al konservado de naturaj rimedoj, daŭripova terkulturado kaj produktado de nutraĵoj sen aĉaj kemiaĵoj. Bone, laŭdinda celo, sed mi demandis, ĉu li scipovas la hispanan lingvon? Nur balbute, tre malmulte ĝin komprenas. Sen komuna lingvo, ĉio estos ege malfacila por tiu juna usona sciencisto, ĉar li planas loĝi ekster la turismejoj, kie ĉiuj parolas la anglan, li emas al kontakto kun la kamparanoj kaj terkulturistoj, ne kun la edukitaj intelektaj elitoj de la urbegoj. Do, jen granda tempoinvesto kadre de lia restado en la insulo, lernado de la hispana...

Mi cerbumis, kiom pli facile estus, se li scipovus Esperanton. Kiom da kontaktoj tra la tuta lando mi povus provizi al li, de homoj kiuj laboras en ĉiuspecaj produktoj, de homoj kiuj fratece gastigos lin, nutros lin kaj dividos kun li la plej valoran trezoron troveblan tie, la varman koron de la popoloj. Eble mi sugestos al li, antaŭ ol vojaĝi, pasigi monaton lernante la internacian lingvon. Eble mi konvinkos lin se mi nur rakontas, kiom riĉega kaj malsimila estis mia vivosperto kiel studento en Japanujo, kie mi kunvojaĝis kun grupo de usonanoj kiuj ĉiutage miris, kiom multe mi ĝuis kaj profitis la kontakton kun tiuj “specialaj japanoj” kiuj malfermis por mi siajn domojn, kaj permesis al mi trabori la izolitecon de ĉiuj eksterlandanoj kiuj tie aventure kuraĝas elpaŝi el la turismaj cirkloj. Nu, eble...

Estimataj: eble ni devos pli aktive en la venonta 2013 diskonigi al niaj apuduloj la avantaĝojn kiujn ni ĝuis dum longa tempo, ne tiom zorgi pri la grandaj filozofiaj problemoj de preteco kaj taŭgeco kaj anstataŭe prizorgi la etajn problemojn rilatajn al kreado de pli bona monda socio, po unu homo en ĉiu paso. Ek!

# NASK 2013

Ĉi-jare NASK okazos ĉe la Universitato William PEACE en la centro de bela Raleigh, ĉefurbo de Norda Karolino, **de la 26-a de Junio ĝis la 5-a de Julio** – ok tagoj da lernado, amuzo, kaj esplorado de la mirindaj muzeoj, restoracioj, butikoj, kaj sidejoj de la registaro, ĉiuj piede atingeblaj de la universitata kampuso.

La internacia teamo de István ERTL (Hungarujo), Derek ROFF (Usono), kaj Lee MILLER (Usono) instruos trinivele. Hoss FIROOZANIA deĵoros kiel helpinstruisto kaj organizanto de la eksterkursaj eventoj.

**Lernantoj povas resti post NASK por partopreni en la tuj posta Landa Kongreso de Esperanto-USA (de la 5-a ĝis 8-a de Julio), kiu okazos en la samaj konstruaĵoj.**

Se vi volas partopreni en la Landa Kongreso, nepre aliĝu per la retbutiko de Esperanto-USA [<http://esperanto-usa.org/retbutiko>].

La ĝenerala kotizo de NASK (por kursoj, loĝejo, kaj manĝoj) estas **US \$725.00 ĝis la 22-a de Marto, kaj US \$775.00 poste**. Partoprenantoj loĝos en du-personaj ĉambroj. Por loĝi sole, aldonu US \$180. Lokanoj kiuj ne bezonas loĝejon rajtas pagi nur la kurskotizon kun tagmanĝo (US \$320) aŭ sen tagmanĝo (US \$250). **Stipendioj haveblas por plentempaj studentoj kaj instruistoj, ankaŭ por tiuj, kiuj loĝas en Latinameriko.**

**Bonvolu kontakti administrantinon Ellen M. EDDY per <[eddyellen@aol.com](mailto:eddyellen@aol.com)>.** Por pli da informo, vizitu la TTT-ejon de NASK [<http://esperanto.org/nask>].

## Pri la loĝejo

Partoprenantoj dividos kvar-homajn ĉambrarojn

(ĉiu kun du dormoĉambroj kaj necesejo) en klimatizita loĝejo. Al ĉiu gasto oni provizos litotukojn, litkovrilon, kapkusenon, bantukojn, kaj sapon. Ni rekomendas ke oni kunportu etan lampon por legi, vekhorloĝon, pli pezan litkovrilon, se vi preferas, kaj vestarkojn. En la loĝejo estas tri komfortaj salonoj, ĉiu kun televidilo kaj foteloj. Ankaŭ troviĝas du kuirejoj, ĉiu kun fridujo kaj mikroonda forno, kaj senpagaj lavmaŝinoj/sekigiloj por vestaĵoj.

Senpaga vifio (sendrata aliro al Interreto) haveblas tra la kampuso. La manĝejo estas piede nur unu-du minutojn for, kaj la kuiristo provizas diversajn bongustajn pladojn el kiuj oni povas elekti. Tra la kampuso troviĝas ankaŭ vendmaŝinoj kiuj akceptas kontantan monon, de kiuj oni povas aĉeti diversspecajn manĝetaĵojn kaj trinkaĵojn.

## Pri la Universitato William PEACE

Kiam ĝi estis fondita en la jaro 1857, oni nomis la lernejon *Peace Institute* honore al William PEACE, komercisto kaj presbitero el Raleigh, kiu donacis monon kaj terenon por helpi fondi la lernejon.

La Enlanda Milito interrompis konstruadon de la Ĉefa Konstruaĵo kiam la Konfederacio uzis ĝin kiel malsanulejon por vunditaj soldatoj. Post la milito, la federacia registaro uzis la konstruaĵon kiel ŝtatan ĉefsidejon de la *Freedmen's Bureau* ("buroo de liberigitoj"), kiu helpis al ekssklavoj starigi novajn vivojn.

Peace Institute malfermiĝis en 1872 kun programoj por kaj geknaboj kaj junulinoj. En la 1980-aj jaroj, *Peace College* jam fariĝis subkolegio por virinoj, kaj en 1996 ĝi fariĝis kvar-jara bakalaŭra kolegio. En 2011 ĝi fariĝis institucio por ambaŭ seksoj, kaj oni renomis ĝin *William Peace University*.



## NASK 2013

This year NASK meets at William Peace University in the heart of beautiful Raleigh, the capital of North Carolina. **Arrive on June 26th and depart on July 5th** for eight days of learning, fun and exploration of the city's wonderful museums, restaurants, shopping, and various seats of government, all within walking distance of the campus.

The international team consisting of István Ertl (Hungary), Derek Roff (U.S.), and Lee Miller (U.S.) will provide three levels of instruction. Hoss Firooznia will serve as an assisting teacher and will organize extracurricular activities.

**Students can remain after NASK to participate in the Esperanto-USA convention from July 5th–8th, which takes place in the same classroom building and residence hall.** If you would like to participate in the convention, please be sure to make the necessary arrangements at the Esperanto-USA store [<http://esperanto-usa.org/retbutiko>].

The general fee for NASK 2013 (courses, lodging and meals) is: **US \$725.00 until March 22nd, and US \$775.00 thereafter.** Housing is in two-person dorm rooms. For a single room, add US \$180. Locals not needing housing have the option of US \$320 course fee only with lunch, or US \$250 course fee only with no meals.

**Scholarships are available for full-time students and teachers, and for residents of Latin America.**

**Please contact Ellen M. Eddy, the administrator, at <[eddyellen@aol.com](mailto:eddyellen@aol.com)>.** For more information, please visit the NASK website [<http://esperanto.org/nask>].

### Lodging and facilities

Students will share four-person suites with a shared restroom and two bedrooms in an

air-conditioned residence. A linen package will be provided to all guests which includes bed linens, blanket, pillow, towels, washcloths and soap. It is recommended that guests bring comfort items such as a small reading lamp, alarm clock, heavier blanket or quilt, if desired, and clothes hangers. The residence hall contains a comfortable lounge on each floor with television and upholstered seating, and two kitchens with refrigerator and microwave are available. The residence hall is also equipped with complimentary laundry facilities.

Complimentary access to the Internet is available via the University's wireless guest network throughout campus. The dining hall is a pleasant one-minute walk from the residence hall and classroom building, and the caterer serves a variety of options from which to choose. Coin-operated vending machines located around campus offer a variety of snacks and beverages.

### About William Peace University

Founded in 1857, the school was named Peace Institute in honor of William Peace, a Raleigh businessman and church elder who pledged money and land to help establish it.

The Civil War interrupted construction of the university Main Building when it was used by the Confederacy as a military hospital. During Reconstruction the Federal government used the building as the North Carolina headquarters for the Freedmen's Bureau, which helped former slaves establish new lives.

Peace Institute opened in 1872 with programs for both children and young women. By the 1980s Peace College had become a junior college for women, and in 1996 it became a four-year college granting baccalaureate degrees. In 2011, the institution became coeducational and was renamed William Peace University.

# Landa Kongreso 2013

La venonta jarkongreso de Esperanto-USA okazos de vendredo, la 5-a de Julio vespere ĝis lundo, la 8-a de Julio tagmeze ĉe la Universitato William Peace apud la urbocentro de Raleigh, Norda Karolino, tuj post la Nord-Amerika Somera Kursaro samloke.



Venu al Raleigh en 2013!

Ni aparte invitas komencantojn kaj alilandanojn partopreni.

Kongresanoj povos loĝi malmultekoste en studenta dormejo, unu aŭ du homoj en ĉambro. (Du ĉambroj dividas banĉambron.) Kelkaj hoteloj troviĝas proksime.

Eblos aĉeti pakaĵon de manĝoj en la universitata manĝejo aŭ se oni preferas manĝi aliloke, estas multaj restoracioj atingeblaj piede aŭ pere de senpaga aŭtobuso.

Eblas vojaĝi al Raleigh pere de aviado (flughaveno RDU), fervojo (Amtrak), aŭtobuso (Greyhound), kaj aŭtomobilo.

La kostoj estas baldaŭ anoncotaj kaj similos al tiuj de la lastjara kongreso en Teksaso.

La temo ĉi-jare estas *Informado, Instruado, Utiligado*, kaj la programo rilatos al tiuj kampoj pere de prelegoj, kursetoj, diskutoj, kaj metiejoj, ekzemple:

- **Informado:** Kiel organizi kaj pliaktivigi lokan grupon. Kiel uzi sociajn mediojn kiel YouTube kaj Facebook. Kiel prezenti Esperanton en la moderna mondo. Kiaj aliroj plej sukcesas aŭ malsukcesas?
- **Instruado:** La plej aktualaj ideoj pri lernado de Esperanto. Instruado en la reto. Kion faras Esperanto-USA, ESF, Edukado.net, Lernu.net, AAIE, ILEI, kaj aliaj organizaĵoj.
- **Utiligado:** Kiel vojaĝi, amuziĝi, lerni, kaj komuniki trans lingvaj bariloj pere de Esperanto. Kiuj lastatempaj (kaj malnovaj) libroj, muzikaĵoj, filmoj, retejoj, gazetoj, radioprogramoj, blogoj, ktp en Esperanto estas plej interesaj.

Krom la tradiciaj paroloj kaj diskutoj, ni esperas oferti la eblecon aktive lerni kaj fari ion – ekzemple kiel fari mallongan filmon aŭ partopreni en senpaga internacia video-konferenco.

Ni havos ankaŭ ekskursojn dum kaj post la kongreso por viziti muzeojn, historiplenajn domojn, ktp.

Detaloj kaj plia informo aperos en la TTT-ejo de Esperanto-USA [<http://Esperanto-USA.org>] kaj en venontaj numeroj de *Usona Esperantisto*.

## Esperanto-USA National Convention for 2013

The next annual convention of Esperanto-USA will take place from Friday evening July 5 until midday Monday July 8 at William Peace University near downtown Raleigh, North Carolina, immediately after the North American Esperanto Summer Courses at the same location.



Visit Raleigh in 2013!

We especially invite beginners and foreign visitors to take part.

Inexpensive lodging will be available in a student dormitory, one or two persons per room, with two rooms sharing a bath. Several hotels are located nearby.

It will be possible to buy a meal package for the university cafeteria or alternatively there are a number of restaurants in walking distance or reachable by means of a free bus.

It's possible to reach Raleigh by air (at RDU International Airport, rail (Amtrak), bus (Greyhound), and car.

Pricing is being finalized and will be announced soon at levels similar to last year's convention in Texas.

The theme this year is *Information, Instruction, and Utilization*, and the program will address those three fields by means of talks, short courses, discussions, and workshops. For example:

- **Information:** How to organize and energize a local group. How to use social media such as YouTube and Facebook. How to present Esperanto to the modern world. What kinds of approaches succeed or fail?
- **Instruction:** The most up-to-date ideas about learning Esperanto. Teaching on line. What do Esperanto-USA, ESF, Edukado.net, Lernu.net, AAIE, ILEI, and other organizations do?
- **Utilization:** How to travel, be amused, learn, and communicate across language barriers by means of Esperanto. Which recent (and old) books, music, films, web sites, magazines, radio programs, blogs, etc. in Esperanto are the most interesting.

Besides traditional talks and discussions, we hope to offer participants the ability to actively learn and do things – for example how to make a short film or take part in a free international video conference.

We'll also have excursions during and after the convention to visit museums, historic houses, etc.

Details and additional information will appear in the Esperanto-USA website [<http://Esperanto-usa.org>] and in future issues of *Usona Esperantisto*.

# Mia malkovro de Japanujo (*dua parto*)

Ĵenja AMIS

Jen la dua parto el la aventuroj de Ĵenja. Legu la unuan parton en n-ro 2012:5.

## Ŝinkansen malfruas... ne sufiĉe!



La rapida trajno en Ŝinkansen.

Post la du perfektaj tagoj en Hiroŝimo ni veturas al Kioto. Estas mia unua fojo en Ŝinkansen – la fama japana trajno, la plej rapida en la mondo. Dum sia 45-jara historio kaj 6-miliarda kvanto da pasaĝeroj, en Ŝinkansen neniam okazis akcidento, kiu kaŭzis morton. “Ŝinkansen neniam malfruas”, diras mia edzo Joel, loĝinta du jarojn en Japanujo. La alventempo de Ŝinkansen averaĝe varias de la celita tempo je nur 6 sekundoj, kaj en iuj direktoj la trajnoj venas ĉiujn kelkajn minutojn. Nia trajno kuras tiom rapide, ke la fostoj de pontoj kvazaŭ tute malaperas, sed ial la rapideco de 240-300 km/h tute ne sentiĝas. Sed ironie, ĝuste en tiu ĉi tago, Ŝinkansen malfruis je tuta horo pro pluvego (aŭ eble pro tiu fanfaronado de Joel, mi ne certas). Nia gastigantino, sinjorino TAHIRA Masako diras, ke se ĝi malfruiĝas je du horoj, oni redonas monon. (“Do, ĝi malfruiĝis, sed ne sufiĉe!” mi ŝercas.) Ŝi rakontas, ke iam vizitinta esperantisto el Ĉeĥujo miris, ke oni anoncis 5-minutan malfrumon de Ŝinkansen: “En Ĉeĥujo oni opinias kvin-minutan malfrumon ‘ĝustatempa’”, li diris.

La grandega stacidomo de Kioto estas plena je homoj. Estas la tempo de la festo Ulambano, kiam ĉiuj japanoj revenas hejmen por honori la mortintajn prapatrojn. Estas varmege kaj ege humide – Aŭgusto ja estas la plej varma monato en Japanujo. Por iom malvarmigi la lokon, en la stacidomo de Kioto oni disĝutetigas akvon – tio iomete malaltigas la temperaturon, sed aldonas al la jam ega humideco.

## “Tahira-hotelo” en Kioto



Eta deflankiĝo. Kiam mia edzo Joel sendis al s-ino Tahira mesaĝon pri nia intenco vojaĝi al Japanujo, jam ene de du aŭ tri tagoj ni ricevis la tutan provizoran itineron, jam kun renkontiĝoj kun pluraj Esperanto-kluboj! Tio estis nur antaŭgusto de la vere nekredeblaj japanaj gastamo kaj zorgemo, kiujn ni spertis dum nia restado. Ni estas ege dankemaj al ŝi, kaj al ĉiuj bonkoruloj, kiuj gastigis kaj ĉiĉeronis nin!

Gesinjoroj Tahira loĝas en centjara eta domo. Mia gvidlibro nomas tiajn longajn lignajn vic-domojn “Maĉija”-domoj (“urbaj domoj”) kaj klarigas, ke en la malnova tempo oni pagis impostojn laŭ grandeco de fasado: do, pro tio la fasadoj estas kutime malgrandaj, sed la domoj mem estas



longaj. La tre eta kuirspaco (ĉar ne vere aparta ĉambro) troviĝas en koridoro – unu ŝtupon sub la nivelo de la tatamo-ĉambroj; malantaŭe “Maĉija”-domoj ofte havas etan ĝardenon. Esenca parto estas la glisantaj pordoj, kiuj ebligas jen grandan salonon por akcepto, jen kelkajn dorm-ĉambretojn. S-ino Tahira diras, ke oni nomas tiajn malnovajn vic-domojn “harmonikaj domoj” (ĉar tiel ili aspektas!) kaj ŝercas, ke la najbaraj domoj fakte subtenas unu la alian kaj tiel ne falas.

Je nia alveno, Masako donas al ni du kaskojn por surmeti okaze de tertremo – bona memorigo, ke ni estas en loko kie oftas tertremoj. (“Tio donus novan signifon al la esprimo ‘morti pro Esperanto’, se oni estus mortigita per falantaj Esperanto-libroj!” ŝercas Joel – ĉar ŝia domo plenplenas je Esperanto-libroj). La domo de gesinjoroj Tahira jam travivis multajn tertremojn – bonŝance ĝi neniam estis severe damaĝita, sed ĝi kelkfoje iomete moviĝis, kaj pro tio oni bezonas iom da forto por movi la glisantan pordon. Tre ofte la modesta domo estas amika “hotelo” por esperantistoj vizitantaj Kioton. Same estas por ni – fakte, ĝi fariĝas nia “kansaja bazo” (Kansajo estas regiono de Japanujo kie situas Kioto, Osako, Kobe, i.a.), de kie ni ekskursas al aliaj urboj preskaŭ ĉiutage. Mi certas, ke ĉiuj iliaj vizitantoj same multe ĝuis, kiel ni, la babiladon kun gesinjoroj Tahira!

## “Elstara lingvo”


Kaj Masako, kaj ŝia edzo Minoru multege laboras. Masako estas interalie UEA-aktivulo (delegito, iam komitatano, ktp.), JEI-aktivulo kaj provlegisto de pluraj E-eldonaĵoj. Minoru laboras kiel instruisto de la angla en lernejo kaj en “ĝuku” – speciala lernejo, kiu pretigas gejunulojn por la malfacilaj universitataj enir-ekzamenoj. Laborante en diversaj urboj, li ofte foriras je la sesa kaj revenas ĉirkaŭ noktomezo – aldone al tio, li foje provlegas lernolibrojn pri la angla! Minoru, tamen, tute ne plendas: tia vivo permesas al li multe vojaĝi per la rapidegaj trajnoj al Ŝinkansen, lia plej ŝatata loko! “La angla estas por enspezi monon, Esperanto – por elspezi”, ŝercas Minoru.

Se Esperanto estas malfacila por japanoj, la angla estas por ili malfacilega. Fakte, la japana ideogramo por “la angla lingvo” povas ankaŭ signifi “elstara lingvo”, kaj ĉiuj strebas perfektigi en ĝi. Sed malgraŭ tio, ke oni elspezas amason da mono (kaj tempo) en “ĝuku”, kaj ofte eĉ tute bone komprenas la skribitan anglan, sufiĉe malmultaj japanoj sukcesas flue paroli ĝin. Por fari universitatan ekzamenon oni devas scii (almenaŭ skribe) ĉirkaŭ kvin mil vortojn, povi legi kaj kompreni sufiĉe malfacilajn tekstojn kaj ankaŭ traduki (ambaŭdirekte). La parolado ne estas parto de la ekzameno, kaj oni povas tute bone fari la ekzamenon sen diri eĉ unu vorton en la angla. Minoru diras, ke ofte estas la kulpo de instruistoj, kiuj tuj korektas ĉiun eraron kaj tiel timigas la lernantojn. Povas esti tiel, ĉar japanoj ĝenerale estas tre perfektemaj kaj timas embarasiĝi pro eraro. Cetere, por lerni la lingvon oni ofte devas paroli pri si, kion japanoj ankaŭ ne emas fari.

## Vizito al Oomoto

De nia “kansaja bazo” Kioto ni trajnas al Kameoka – unu el la du ĉefaj centroj de la religio Oomoto, kien ni estas invititaj de ties Internacia Fako por partopreni en la junulara festivalo okaze de la 120-a datreveno de Oomoto. Kameoka estas urbo kun ĉirkaŭ 90 mil loĝantoj kaj troviĝas apud la montaro kaj la bela Hozu-rivero, kies zigzagan vojon oni povas vidi el la trajno. La vorto “Kameoka” signifas “testuda monteto”, kaj tute prave, ni ofte vidas testudojn trankvile kuŝi sur ŝtonoj en laĝetoj. (Amuze, la ideogramo por testudo estas unu el la manpleno da ideogramoj, kiujn mi lernas dumvojaĝe, ĉar ĝi fakte iom aspektas kiel testudo). La Oomoto-Centro troviĝas nur dek minutojn piede de la stacidomo kaj nemalproksime de la urbocentro, sed la loko estas tiom trankvila, ke oni povas pensi, ke oni estas tute ekster la urbo.

## Toŝi, nia “bona ĝino”



Kun Toŝi en la Oomoto-centro en Kameoka

Antaŭ nia alveno, nia ĉiĉerono en Oomoto – s-ro OKUŬAKI Toŝiomi (Toŝi) – demandis, ĉu ni havas iujn dezirojn por ke li provu realigi ilin. Ni diris, ke se, hazarde, dum la festivalo okazos te-ceremonio, ni volas partopreni ĝin, ĉar mi neniam faris tion antaŭe. Antaŭ nia alveno Toŝi informis nin, ke ni bonŝancas, ĉar ja okazos te-ceremonio dum nia vizito – fakte tuj post nia alveno. Ni alvenas iomete malfrue kaj timas maltrafi la ceremonion, sed, feliĉe, ĝi ankoraŭ ne komenciĝis. Ni iras al la te-ceremonia domo kaj devas enskribi niajn nomojn en la gastolibro – per inko kaj tuĉpeniko. Joel studis la japanan, kaj do sukcesas pene skribi niajn nomojn per katakana alfabeto. (“Sufiĉe proksime”, Toŝi diras.) Kiam mi konstatas, ke ne estas aliaj nomoj en la listo, mi komprenas, kial la ceremonio ankoraŭ ne komenciĝis: ni estas *la solaj* invititoj!

Mi eksuspektas, ke Toŝi fakte estas ĉionscيا kaj ĉionpova ĝino, kiu magie povas realigi ĉiun deziron. Tiu suspekto poste konfirmiĝis: jen mi havas iun malfacilan demandon – responde venas tuta libro, kiu detale pritraktas ĝin. Jen mi bezonas tradukon aŭ interpreton – Toŝi estas apude por helpi. Jen mi petas kutiman verdan teon – kaj post kelkaj minutoj antaŭ mi aperas belega te-bovlo kun luksa muelita teo *Matcha*. Jen ni bezonas trajnhoraron – ĝi venas elprintita, kun ĉiuj klarigoj. Eĉ kiam ni devas foriri, Toŝi iras kun ni ĝis Kioto – malgraŭ niaj protestoj, ke ne necesas – por certigi, ke ni kaptas la ĝustan

trajnon. (Bonŝance por ni, ĉar nia trajno estas nuligita, kaj li do devas rearanĝi la itineron!) Ĉar Toŝi laboras en la Internacia Fako, li ofte devas zorgi pri vizitantaj eksterlandanoj. Li estas tre entuziasma pri sia laboro, tamen eble malfacila parto de lia laboro estas “varti la infanojn”, kiel nin, kiuj ne komprenas la japanan lingvon aŭ ĉiujn subtilaĵojn de la japana etiketo.

## Aŭtentika te-ceremonio



La oomotanoj ofte lernas kaj praktikas diversajn artojn (kaligrafion, ceramikon, batalartojn, tradician japanan muzikon kaj noo-teatron). Ankaŭ te-ceremonio estas unu el la praktikindaj artoj. La te-ceremonio, kiun ni spertas, estas fakte ekzercado – ĝin okazigas du belaj virinoj, sub la gvido de sperta instruistino, ĉiuj en tradiciaj vestaĵoj. En mia notlibro mi skribas “knabinoj” – tion junaj ili aspektas; sed kiel mi ekscios poste, ili estas pli aĝaj ol mi pensis, ĉar ĝenerale japaninoj aspektas pli junaj ol eŭropaninoj – eble ĉar ili ĉiam bone kaŝas sin de la suno. La ceremonio komenciĝas eĉ antaŭ nia eniro en la ĉambron (surgenue). Antaŭ la enirejo ni ricevas etan falditan ventumilon, kiun oni en diversaj momentoj devas meti jen antaŭ sin, jen flanken. Ĉiuj agoj de la junulinoj aspektas tre graciaj kaj bone ellernitaj. Jen oni purigas la bovlojn, la ilojn, jen boligas kaj verŝas akvon, jen ŝaŭmigas la teon. Ĉio ĉi aspektas kiel teatraĵo, tiel lertaj ili estas. Antaŭ ol trinki la teon, ni manĝas la dolĉaĵojn por mildigi la fortan guston de la teo: sukeritajn soj-fabojn kaj ĵeleon. Antaŭ ol trinki la teon, oni

devas turni la bovlon tri fojojn por plene admiri ĝin. Oni turnas tri-foje ankaŭ post la trinko. Mia tebovlo estas blua, kun foliaj desegnaĵoj – ĉar estas somero, ĝi havas tiajn florajn motivojn. La stilo de tasoj ŝanĝiĝas laŭ la sezonoj. La teo mem estas verdege-verda, kiel farbo, tre ŝaŭmeca kaj bongustega.

Estas aparta talento sidi surgenue tiom longe sen dolorigi la kruojn – niaj kruoj ja iom doloras post la longa sidado, tial ni eĉ pli aprezas la konsilon de la te-mastrino moviĝi iomete, meze de la ceremonio.

## Vivantaj ŝtonoj de Kameoka



Je la kvina matene oni komencas ludi muzikon tra la Oomoto-Centro – ĝi komenciĝas per mallaŭtaj perkut-muzikiloj, kies laŭteco kreskas, kaj al kiu poiomete aldoniĝas aliaj muzikiloj kaj voĉoj. Estas tempo por vekigi. Eble pro la 13-horzona diferenco, aŭ eble ĉar somere en Japanujo heliĝas pli frue ol en Nord-Ameriko (ĉar oni ne ŝanĝas horloĝojn al somera tempo), ni ĉiuokaze vekigiĝas eĉ antaŭ la kvina. Matenpreĝo (kvankam ne deviga por ni) estas je la sesa.

La plejparto de la homoj en la manĝejo estas gejunuloj kaj infanoj – partoprenantoj en la festivalo, sed iu ajn oomotano povas iri tien por unu aŭ kelkaj tagoj da ripozo aŭ meditado. Ankaŭ internaciaj vizitantoj kaj esploristoj ofte venas – ekzemple, praktikantoj de batalartoj naskitaj en Oomoto, kiel ajkido.

La loĝeja kaj administra konstruaĵo estas tute

nova, kaj ĝin daŭre plenigas bona fojneca odoro de nova tatamo. La domo estas tre bela kaj moderna, kaj nia gastĉambro estas tiel bona, kiel en hotelo! Tre plaĉe, ĉiuj skribaĵoj en Oomoto estas en la japana kaj en Esperanto, do ni trovas ĉion senprobleme. Fakte, Esperanto estas konsiderata unu el la praktikindaj artoj, kaj multaj oomotanoj lernas ĝin. Kelkaj grupoj da infanoj kaj junuloj havas T-ĉemizojn kun E-skribaĵoj, kaj multaj el ili ĝojas saluti nin en Esperanto kaj eĉ iom babili dum la manĝo.

Matene ni promenas en la tereno kaj... vizitas ŝtonojn! La ŝtonoj en la Oomoto-Centro en Kameoka multas – ŝtonetoj kovras la teron inter la konstruaĵoj. (En la vestiblo eĉ troviĝas rulseĝo kun grandaj pneŭmatikaj radoj, por bone ruliĝi sur la ŝtonetoj.) La grandaj ŝtonoj staras, kovritaj de musko, kiel gardistoj. Ili vidis multon – silentaj, ili tamen rakontas la historion de tiu ĉi loko. Ili parolas pri la malnova kastelo Kamejama, kiu staris tie ĉi ekde la 16-a jarcento. Ili parolas pri ĝia morto, kaj ankaŭ pri ĝia dua morto: dum la tiel nomata dua Oomoto-afero, la japana registaro detruis la restantan fundamenton de la kastelo. Kial la tiama japana registaro tiel malŝatis Oomoton? Simple ĉar ĝia kungvidanto, DEGUĈI Onisaburo, aŭdacis malferme kontraŭstari la japanan militarismmon...

Du grandegaj ŝtonoj estis eĉ portitaj de aliaj lokoj. Laŭdire, ili havas kuracajn povojn, kaj se oni tuŝas ilin per korpoparto, kiu doloras, ĝi devas kuraciĝi. Sur la ŝtonaj monumentoj estas ankaŭ skribitaj inspiraj poemoj de la forpasintaj gvidantoj. Ŝtonoj estas gravaj por japan-stilaj ĝardenoj (eble ĉar Japanujo mem estas ŝtoneca lando): ili estas grava parto de Ŝinto-sanktejoj, budhistaj temploj, parkoj kaj palacoj. La etaj blankaj ŝtonetoj sur la grundo reprezentas purecon. Certe, ne maltrafendas la grandega Esperanto-ŝtono, sur kiu estas skribita “Unu Dio, Unu Mondo, Unu Interlingvo” – devizo de Oomoto.

La unua parto de la malferma ceremonio konsistas el Oomoto-diservo (Ŝinto-stila – ja Oomoto estas bazita sur Ŝintoo). Fakte, ĝi estas vera spektaklo, kiun komencas tradicia japana muziko. Same kiel te-ceremonio, ĉiuj moviĝoj de



la partoprenantoj en la rito de manĝaj-oferaĵoj estas tre graciaj kaj bone ellernitaj, kaj oni portas vestaĵojn tradiciajn por Ŝintoo. En certa momento de la diservo oni invitas la eksterlandajn vizitantojn (t.e. nin, du personojn el Tajlando kaj unu el Mongolujo) oferi pinajn branĉetojn kun blankaj paperoj antaŭ la altaro.

Post la diservo komenciĝas la efektiva malfermo de la festivalo, kun oficialaj salutoj, k.s. Oni petas nin (kaj la aliajn alilandajn gastojn) saluti la ĉeestantojn – kion ni faras en Esperanto kun traduko en la japanan. Tamen poste atendas nin granda surprizo: la Spirita Gvidantino de Oomoto alvenas kaj, antaŭ ol preni sian lokon sur la podio, haltas por saluti la alilandajn gastojn – vere grandega honoro! (Tamen eĉ plia surprizo atendas nin post la ceremonio – pere de Toŝi, ni ricevas de ŝi du belegajn te-tasojn, faritajn laŭ ŝia propra dezaĵno!) La Spirita Gvidantino tiam aliras la podion, riverencas kaj komencas sian paroladon – Esperante! Fakte ŝi kutimas fari tiel; respekte al la devizo de Oomoto (“Unu Dio, Unu Mondo, Unu Interlingvo”), ŝi komencas kaj finas ĉiun sian paroladon en Esperanto.

## Nebula Ajabe



La Oomoto-sanktejo en Ajabe.

Oomoto havas du centrojn – unu en Kameoka, kaj alian en Ajabe, urbeto kun tridek mil loĝantoj, ĉirkaŭata de altaj montoj, ĉirkaŭ unu horon aŭte de Kameoka. Ni iras tien por nur unu tranokto. Onidire, Kameoka estas la “nebula urbo” – sed ni

vidas pli da nebulo ĝuste en Ajabe. Ial ĉie en Japanujo – sed eĉ plie en Ajabe, frumatene – la nebulo estas tiom densa, kaj la nuboj estas tiom proksime al la tero, ke ili kvazaŭ kaptiĝas en la kronoj de la arboj.

Kameoka estas misia centro de Oomoto, kaj Ajabe estas ĝia spirita centro, kie troviĝas la ĉefa sanktejo: Ĉoosej-den (“Halo de Longa Vivo”), kaj kie fakte naskiĝis Oomoto. Konstruite antaŭ ekzakte 20 jaroj, por la 100-jariĝo de Oomoto, ĝi aspektas kiel tute nova kaj ankoraŭ odoras je freŝa ligno. Ĉoosej-den estas konstruita laŭ antikva japana maniero – tute sen najloj. La nomoj de la du ĉefaj ĉambroj estas Gruo kaj Testudo: tiuj du bestoj reprezentas longan vivon (laŭ legendo, gruo vivas mil jarojn, kaj testudo dek mil jarojn).

En malnova sanktejo de Ajabe troviĝas ekspozicio de pluraj artaĵoj de DEGUĈI Onisaburo kaj atestaĵoj pri internaciaj ligoj de Oomoto: jen la plena kostumo de anglikana pastro el Usono, James Parks MORTON, kiu gvidis anglikanan diservon ĉe Oomoto, por reciproki la diservon, kiun Oomoto faris en la katedralo de Sankta Johano la Teologo (Novjorko) en 1982. Jen foto de la Dalai-Lamao, kiu vizitis tiun ĉi lokon antaŭ iom da tempo, kaj jen la foto de Oomoto-karavano al Mekko. Joel demandas, kiel ili sukcesis viziti ĝin, estante ne-islamanoj? La respondo estas simpla: la invitinta muftio deklaris, ke Oomoto estas Islamo!

Aliaj nepraj vidindaĵoj en la Ajabe-centro estas malnova ligna domo kun pajla tegmento, konstruita en la 17-a jarcento – ĝi eĉ nun servas kiel ejo por te-ceremonioj – kaj lago kun insuloj, kiuj samtempe reprezentas la kvin kontinentojn kaj kvin insulojn de Japanujo. (Nun estas nur kvar ĉefinsuloj de Japanujo, sed kiam oni kreis la lagon, Tajvano estis parto de Japanujo – tiel kvin.)

Nia ĉambro en Ajabe estas tradicia japana tatama ĉambro, kaj vespere nin atendas nekutima sperto: baniĝo en komuna japana banejo, kiel *sentoo*. Por iuj ne-japanoj tio povus esti iom ŝoka. Tradicie, japanoj ĉiam havis komunajn banejojn, kaj antaŭ la usona okupacio ili eĉ estis ofte komunaj por




viroj kaj virinoj. Malsame al eŭropanoj/nord-amerikanoj, kiuj duŝas sin starante kaj baniĝas kuŝante, japanoj duŝas sin sidante sur malalta plasta seĝo, kaj baniĝas sidante. Fakte, ne temas pri baniĝo (por laviĝi), sed pri simpla sidado en bankuvo por malstreĉiĝi, jam post la duŝo – kaj la akvo restas en banejo kelkajn tagojn.

Ĉie en Japanujo estas tre striktaj reguloj pri ŝuoj: oni portas pantoflojn en ĉiuj lokoj, krom en tatamaj ĉambroj (kie oni tute ne portas ŝuojn) kaj krom en necesejo (por kiu ekzistas specialaj pantofloj). Ĉiuj lokoj, kie oni surmetas (aŭ forprenas) pantoflojn, estas indikitaj per alia alteco. En Ajabe-centro estas eĉ tri specoj de pantofloj: unu plia speco de pantofloj estas nur por la manĝejo. La ŝuoj (ĉiam samgrandaj) estas provizitaj en abunda kvanto.



La apogeo de la tritaga festivalo estas dancokonkurso kaj festeneto. La partoprenantoj dancas ĉirkaŭ muzika podio – ĉiuj movoj kaj turniĝoj estas bone planitaj kaj aspektas ege facilaj. (Kiam mi tamen provas mem partopreni, mi komprenas, kiel malfacila ĝi fakte estas!) Multaj junuloj kaj infanoj portas tradiciajn vestaĵojn. Fakte, ankaŭ la festeneto mem estas konkurso: ĉiuj teamoj preparis diversajn bongustaĵojn, kaj oni povas “aĉeti” kelkajn el ili per specialaj kuponoj. La gejunuloj laŭte ĝojas, kiam oni elektas ilin kaj ne la teamon apude. Tre nekutima estas la glaciaĵo, kiu fakte estas... vera glaciaĵo – t.e. pecetoj da glacio, sur kiu oni metas siropon laŭplaĉe.

*[Sekvos la tria parto venontnumere. – Red.]*



### **Jenja AMIS**

Naskita en Kievo, Jenja pasigis kvin jarojn en Atlanto kaj nun loĝas en Montrealo. Ŝi dum jaroj redaktis la revuon *Kontakto*, kaj nun ŝi laboras por la fonduso *Esperantic Studies Foundation*.

[<yevgeniya.amis@gmail.com>](mailto:yevgeniya.amis@gmail.com)

# Translation for learning

D. Gary GRADY

Translation exercises used to be widely used in language teaching up through the 1800s, but in the last century or so they have fallen out of fashion. Today's language teachers try to get students thinking in the new language as much and as soon as possible. Thinking in one's native language while trying to communicate in the other causes painful delays in both directions and leads to errors and misunderstandings, as the patterns of one language leak into the other. Classroom translation is also frowned on as an inefficient use of classroom time — an outdated, unnatural, and old-fashioned holdover from the so-called Grammar-Translation method that dates back to the 1700s, and from still older styles of language teaching associated with teaching Latin and Greek.

A more subtle objection is that translation is inherently confusing to students, because, as Jeremy Harmer put it in *The Practice of English Language Teaching* [<http://worldcat.org/oclc/9217150>], "Not all languages have words for exactly the same concepts, and it is often the case that in a given language there is not really a word which means the same as a word in another language." Deliberate or unintentional ambiguity, puns, and so on can be literally impossible to translate. Robert Frost famously said, "Poetry is that which is lost in translation." If a student is learning French with the goal of using French, why not have the student simply use French and not confuse matters by bringing in a different language?

These objections are for the most part reasonable, but there are also arguments that run the other way. Well over a decade ago, I heard John Wells make the excellent pragmatic point that in the real world, people who know two languages often need to translate from one to the other, making translation a useful skill in itself. It comes up in all

manner of contexts, from helping a foreign visitor to simply answering a question on the order of "How would you say \_\_\_ in Esperanto?"

More recently other authorities on language instruction have said similar things, notably including Guy Cook, a professor at King's College London, whose much-discussed book *Translation in Language Teaching* [<http://worldcat.org/oclc/613313278>] won the Ben Warren International House Trust Prize for the most outstanding work of 2010 in the field of language teacher education. The language teaching community is coming around to the idea that there's a place for translation in language teaching after all. (And in fact, it never entirely went away.)

So how might you want to use translation in teaching or learning Esperanto?


For a start, it's worth reiterating that the objections mentioned earlier still have merit. Students really should learn to converse, read, and write directly in Esperanto. It's probably not a good idea to make translation a major focus of instruction — unless, of course, translation is the subject of the particular class in question!

At the same time, translation is going to come up naturally in teaching. One of the first questions students should learn to ask is "*Kiel oni diras \_\_\_?*" This is a legitimate question even in a direct-method course, and I suspect it likely to encourage students to speak more, not less.

Translation can go both ways, and as a practical matter, students need to be able to handle both directions. A nice conversational exercise would be to have three students take turns playing an English speaker (or whatever the native language might be), an Esperanto speaker, and a translator helping them communicate. The conversation could involve something mundane such as ordering in a restaurant or asking directions or

talking about oneself, or for greater amusement the situation could be something more exotic, anything from interrogating a spy to a pick-up attempt in a singles bar. And as with many exercises, it can be useful not just in a formal classroom setting but at a club meeting or during an *interkonatiĝa vespero* at a *kongreso*.

When William Auld was editing *La Brita Esperantisto*, one of the most popular regular features was a translation challenge called *Traduku!* [<http://goo.gl/wqfKV>] Readers were invited to send in their best effort at producing an Esperanto version of a short



passage chosen from a recent English-language newspaper or magazines article. They were often full of highly idiomatic English, and coming up with Esperanto equivalents required creativity. In the next issue Auld would take particularly difficult expressions in turn and discuss various proposed translations. An overall winning entry would be named, and Auld would offer what he deemed the best translation, usually combining the best of multiple reader submissions.

Something similar could be a nice group exercise for a class or club meeting or an email discussion list. The subject can also come up naturally in discussions, of course. I recall a discussion many years ago in an Esperanto Usenet group (something a lot of you may be too young to remember – far too many things lately remind me of my age) of the best way to translate “World Wide Web.” A number of ideas were proposed, many of them based on “araneaĵo”, but the consensus winner was “Tut-Tera Teksaĵo”, which later became established usage. It’s not often that I’ve been present at the successful coining of a new expression. (I wish I could claim some credit for the idea, but I was purely a spectator.)

In *La bona lingvo* [<http://rano.org/piron>], Claude Piron mentions translating a work of fiction into easy Esperanto for beginners, and how impressed he was that a small set of root words, prefixes, and suffixes really can be used to express a remarkable

amount, just as Zamenhof intended. This suggests that translating from English into Esperanto, or for that matter writing a short story or article in Esperanto, doesn’t necessarily require a large vocabulary.



Incidentally, this brings up a subject that isn’t unique to Esperanto but is particularly relevant to it – that of word-building, something independent from the two traditional subjects of language study, mastering the grammar and memorizing vocabulary. In Esperanto, if you can’t remember a word you can often invent it. (“*Kiu besto bojas?*” “*Ah–[paŭzo por provi memori la vorton] Malkato!*”) Using that productive feature of Esperanto takes practice, and translation is one way to develop it.

At the same time, looking up words in an English-Esperanto dictionary isn’t a bad thing either, especially when the translation needs to be precise. (*Arbo* is fine for some purposes, but sometimes it’s best to use *kverko*.) One of the most obvious uses of translation is developing one’s vocabulary.

For more experienced speakers of Esperanto, another useful exercise, on the high end of the difficulty scale, is simultaneous translation. You can listen to a television program or a radio newscast or whatever you like and translate it into Esperanto while you listen. It’s hard to do this for more than a few minutes (or sometimes seconds) at a time, and even UN interpreters have to take frequent breaks. But on the other hand it’s not quite as completely impossible as you might think.

There’s another skill that often relates to translation, even though it isn’t translation as such. When you’re carrying on a conversation in Esperanto, even if you’re thinking directly in Esperanto, you’ll occasionally draw a blank on how to say something, even though you can say it easily enough in English. You can fall back on “*Kiel oni diras \_\_\_\_\_ en Esperanto?*” but that only works if the person you’re talking with also

happens to know English. Hence it's helpful to be able to describe reasonably succinctly what you're trying to say, even if you can't say it as directly as you'd like. If you can't think of the word for *tire* in Esperanto, you might say something like, "*la kaŭĉuka jako ĉirkaŭ la rado de aŭto*". This is something similar to word-building skill but not quite the same thing.

In summary, as another writer said a while back, translation enriches vocabulary, increases the number of figures of speech we can use, and develops the ability of interpretation. In translating the writings of the best authors we improve our own powers of expression, because

translation forces us to notice details that would otherwise escape our attention. That was the opinion of a Roman named Pliny, nearly 2,000 years ago.



**D. Gary GRADY**

Gary is editor of the bulletin of the American Association of Teachers of Esperanto. He lives in Durham, NC.

**<dgarygrady@frontier.com>**



## du jaroj kamerune

---

### Indaj aĵoj

Joshua MORRIS

Vekiĝinte, mi aŭdis la sonon de muso manĝanta. “Bonan matenon, kara kunloĝanto”, mi salutis. Jam delonge mi ĉesis zorgi pri la aliaj vivantaĵoj ĉe mi. Estas nenio farebla; ili estis tie unue. Mi streĉiĝis kaj paŝis al la necesejo. “Kio nova hodiaŭ?” mi demandis al la mortintaj insektoj kiuj ornamis la necesejan fenestron.

Ili ne respondis.

“Same ĉe mi.”

Ekstere, nebulo malrapide supreniĝis de la banan-arboj sub frumatena arĝenta ĉielo, dum junaj virinoj portis grandajn kruĉojn de akvo surkape.

“Ho hm...”, mi oscedis.

Mi malrapidis al la kuirejo kaj metis tri grandajn, plenplenajn kulerojn da solvebla kafo en tason de malvarma akvo. Mi trinketis la nigregan likvon. “Ŭaŭ,” mi tuis, “tio malfermos miajn okulojn!”

Viro bezonas iom da interna movforto por pasigi longan tagon farante nenion. Estis jam Junio, la lerneja instruado jam finiĝis, kaj mi ja enuis. Mi kontente enuis. “Mi profitos de ĉi tiuj tri liberaj monatoj”, mi diris al mi, malfermante *Harlequin*-romanon. *Kiam la Pasio Sin Implikas*. Du novaj kolegoj, ĉarma viro kun rava rideto, kaj belega, sprita virino ial aĉetis domon kune. Post 135 paĝoj da parolado pri sentoj, ili geedziĝis kaj naskis kelkajn infanojn.

“Ŭaŭ”, mi diris, fermante la libron konsidereme. “Oni estis pagita por tio.” Mi trinketis la reston de la dentosolvanta kafo. “Mi povus verki ion pli bonan ol tiun nelegindan forĵetaĵon. Kaj certe estus io en ĝi pli interesa ol tedaj *sentoj*.”

Mi prenis notlibreton kaj mordetis mian malsupran lipon, pensante. “Mi ĝin titolos...”

ummm... *Dolĉamoro*.” Mi min laŭdis. Tre bona titolo. Mi komencis skribi:

La sonorilo super la pordo de la kafejo tintis kiel trinkmono en la poŝo de fraŭlino Dolĉa. Kliniĝante antaŭen por verŝi kafon en la tason de maljuna sinjoro Harper, ŝi rigardis supren kaj ridetis al la novalvenanto.

“Bonvenon, kara. Sidiĝu ie ajn.”

La alta viro kun larĝaj ŝultroj kapsalutis kaj kondukis sin al tablo en angulo.

Dolĉa alportis menuon kovritan per bildoj de fritajoj. “Ĉu vi havas nomon, kamionisto?” ŝi demandis, ridetante plenbuŝe.

“Mac”, solene respondis la kamionisto tra siaj lipharoj.

“Ho. Nu, vi estas tiel granda, do mi nomos vin ‘Big Mac.’ ”

“Prefere ne”, li diris.

“Genia”, mi anoncis gaje al la malplena ĉambro. Mi zum-zum-zumis pro la kafo. Tiam mi aŭdis vokon tra la pordo.

“*Tu es là?*” demandis mia najbaro, Papa Douala. Li parolas miksaĵon de la franca, la angla, kaj piĝino, kaj li vizitas min preskaŭ ĉiutage por peti ion. Mi min levis kaj malfermis la pordon. “Pa Douala, *Bonjour*.”

“*Merci, bonjour. You are in?*”  
 (“Dankon, bonan tagon. Ĉu vi estas ene?”)

“*Oui. How?*”  
 (“Jes. Kiel vi fartas?”)

“*J’attends la mort. I am sick. Dat high blood di worry me. Ma skin di cratch. A wan go for hospital, buy medecin, shidon fine. A don make*

*plenty basket dem, but no man neva come for buy'am. Money no dey. We dey hungry for house. Black mens di suffa sotey.*"

("Mi atendas la morton. Mi estas malsana. Alta sangopremo maltrankviligas min. Mia korpo doloras min. Mi volas iri al malsanulejo, aĉeti medikamenton, farti bone. Mi faris multajn korbojn, sed neniu venis por ilin aĉeti. Mi ne havas monon. Ni estas malsataj en la domo. Nigruloj suferegas.")

*"Chai! E no easy, eh? You get how many basket dem?"*

("Ho! Ne estas facile. Kiom da korboj vi havas?")

*"Four. Buy'am, A beg, make A go for hospital."*  
("Kvar. Aĉetu ilin, mi petas, permesu ke mi iru al malsanulejo.")

Mi prenis ekvivalenton de kvar usonaj dolaroj el mia poŝmono kaj donis ĝin al li.

*"Thank you plenty, eh! Tu me fais toujours bien. Merci, eh!"*

("Multan dankon! Vi ĉiam traktas min bone. Dankon!")

*"No problem. Nous sommes ensemble."*  
("Nedankinde. Ni estas kune.")

Pa Douala eklametis for. Mi refermis la pordon kaj relokis min antaŭ la notlibreto:

Mac manĝis sian lardon malrapide, senatente.

Dolĉa rigardis lin dum ŝi rondiradis la etan restoracion, viŝante tablojn, plenigante tasojn, alportante fakturojn. Ŝi interesiĝis pri li. "Mi scivolas, kio okupas lian menson..." ŝi pensis, zigzagante inter la tabloj al la meditante kamionisto.

"Kiel vi fartas, Big Mac?"

Mac ekĝemis. "Bonvolu ne nomi min..."

"Ho jen, en via..." interrompis Dolĉa, indikante al siaj dentoj. Ŝi viŝis al si la manon sur antaŭtuko kaj poste metis la montrofingron en lian buŝon, forigante pecon da karbiĝinta lardo

fiksita inter liaj dentoj.

"Eh! Ĝi daŭre genias!" mi ekkriis denove al neniu.

"Sinjoro!" iu vokis ekstere kaj frapis la pordon.

"Jes? Kiu estas?" mi demandis.

"Estas mi." Ĉiuj ĉiam respondas tiel.

"Estas centoj da *mi*-oj en ĉi tiu vilaĝo. Kiu *mi* estas vi?"

"Sinjoro?" li demandis, ne komprenante.

"Eniru", mi rezignis. "La pordo ne estas ŝlosita."

Lernanto eniris kaj salutis min.

"Ho. Michael Jack." Jes, lia nomo estas vere Michael Jack. "Kiel vi fartas?"

"Bone."

"Kion vi alportis al mi?"

"Nenion, sinjoro."

"Domaĝe. Kion vi faras?"

"Nenion, sinjoro."

"Same ĉe mi", mi respondis. Michael Jack sidis malpeze apud mi. Li ekfoliumis la notlibreton.

"Malgranda knabo, ne legu tion", mi riproĉis. Oni rajtas alparoli pli junajn homojn uzante la nomon "malgranda knabo" aŭ "malgranda knabino", eĉ se tiu pli juna homo estas fizike multe pli granda ol la parolanto.

"Mi bedaŭras, sinjoro."

"Ni spektu *whiteman film*." Mi montris por li sciencfikcian filmon.

Michael Jack miris pri la flugantaj aŭtomobiloj. "*Wandaful!*" li kriis.

"Vere. Tia estas *whiteman country*", mi ŝercis. La anglaparolantoj nomas Usonon kaj Eŭropon *whiteman country* ("blankulo-lando").

Li supozis ke mi parolas serioze, do mi klarigis, ke tio estas nur fikcio de filmo, kaj ĝis nun ne ekzistas urboj plenaj je flugantaj aŭtomobiloj. Poste mi reiris al verkado:

“Ĉu vi ĝuis la manĝaĵon?” demandis Dolĉa.

“Ĝi estis bruligita. Ĉio estis brulgusta.”

“Nia kuiristo aĉas”, ŝi ridetis. “Ummm... Ĉu vi eble povus veni kun mi al la stokĉambro por helpi min levi pezan skatolon de buŝtukoj?” Ŝi klinis sin proksime al li. “Mi bezonas iun... grandan.”

“Ne”, mi skuis la kapon. “Nun ĝi ekiras en malĝustan direkton. Tio estas pli erotika ol...”

“Sinjoro, kio estas tio?” Michael Jack trovis skatolmalfermilon kaj rigardis ĝin suspekteme.

“Oni uzas ĝin por malfermi skatolojn.”

“Kiel ĝi funkcias?” li demandis.

Mi demonstris ĝin uzante malnovan kafujon. Li miris kaj volis provi. Li tre fieris kiam li sukcesis.

“*Chai!*” li kriis. “Blankuloj! Vi ĉiuj ĉiam faras tre indajn aĵojn.”

“Ni estas tre mojosaj, ĉu ne?” mi diris. Mi remalfermis la notlibreton kaj skribis:

*(Daŭrigota en venonta numero...)*



### **Joshua MORRIS**

Joshua deĵoras en Kameruno por la usona Pac-Korpuso. Ĉi tie li prezentas siajn proprajn opiniojn kaj ĉiutagajn spertojn (kiuj ne necese reprezentas vidpunktojn de la Pac-Korpuso mem).

**<josxuo@gmail.com>**

## senintenca esperantaĵo?

---

### “Vermaland”



Nia membro Breto SANDERS afable sendis foton de tiu ĉi mirinda anonctabulo, kiun li trovis ekster Fenikso, Arizono. Laŭ li, supozeble temas pri “aparte fekunda grundo, danke al vermoj.” Ĝi tamen situas proksime al nuklea centralo, do li hipotezas ke, eble, per mutacioj, “la vermoj fariĝis inteligentaj kaj kampanjas por starigi propran nacion.” Jes, devas esti. Kiel bonŝance, ke niaj novaj vermaj mastroj parolas Esperanton! (Ĉiuokaze, anstataŭ *Vermaland'*, Breto preferus eble *Vermujo.*)